


# HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, Internacia lingvo



La urbo Strasburgo kie okazos la 76-a  
IFEF- kongreso

Fonto: Stock foto

3  
----- 67-a jarkolekto  
2023



## HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado  
en Hungario  
Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervojista Esperanto-Rondo

Hungara Sekcio

de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

Poŝta adreso: HU-1155 Budapeŝt

Rákos út 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 4500

al eksterlanda adreso: EUR 15

\*

## MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok

központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős

A Magyar Vasutas Eszperantó-Kör

„Szkenguru” Nyomda Budapest

Felelős vezető: Balla László

ISSN 0230-323x

## ENHAVTABELO:

42. I. Gulyás: Kiel plu?
43. A. Barcsa: La 74-a IFEF-kongreso
46. I. Gulyás: Nia generacio
47. L. Gabalda: Mediteranea E. Semajno (MES)
49. L. Gabalda: 39-a Printempa Semajno (PSI)
51. L. Gabalda: Printempa E. Kunveno (PEKO)
53. I. Gulyás: Nova baztunelo ĉe Semmering
55. G. Márkus: Internaciaj renkontiĝoj
57. I. Gulyás: La tago de birdoj kaj arboj
59. I. Gulyás: 75-jara la Budapeŝta Infanfervojo

## KIEL PLU?

Tiu demando okupas min ekde la pasintaj jaroj pri la Esperanto-movado en Hungario. Kompreneble mi ne volas analizi la tutmondan agadon en la Esperanto-aktiveco, sed nur ekzameni la problemojn kaj nesolvitajn demandojn en la agado de la hungara Esperanto-movado.

La Hungaria Esperanto-Asocio antaŭ kelkaj jardekoj estis rekonita organizaĵo, kiun gvidis kaj direktis politikistoj, ekonomistoj kaj publikaj agantoj eĉ ministroj. La membro-nombro de la asocio superis la plurmilojn. Sisteme okazis instruadoj, klubokupiĝoj, komunaj ekskursoj kaj aliaj aranĝoj ktp. Tiam la hungaraj esperantistoj agadis unu apud la alia entuziasme kaj efike. Nuntempe la hungara Esperanto-movado signife ŝanĝiĝis, malpliigi la membro-nombro, eĉ multaj landaj organizaĵoj ĉesis, praktike la instruado paŭzas, inter la estraranoj estas streĉita la interrilato, la financa stato de la asocio ne estas rozkolora, kaj ankaŭ ne havas „normalan” oficejon ktp. Kiel plu HEA?

La hungara fervojista Esperanto-organizaĵo estas membro de tiu asocio. Ni ankaŭ havas multajn verajn problemojn. Inter la plej gravaj malfacilaĵoj mi mencias la ĉeson de la fakgrupoj, escepte Győr, la aĝo de la membraro estas alta, mankas gejunuloj, la financaj statoj estas malbonaj, ankaŭ ni ne havas normalan oficejon k.a. Pro ĉiuj ĉi ekzemploj nia membraro decidis plu agadi en nova organizaĵo: Hungara Fervojista Esperanto-Rondo (HFER). Tiel plu hungaraj fervojistaj esperantistoj!

István Gulyás

67-a jaro N-ro 3, JULIO - SEPTEMBRO

## LA 74-a IFEF-KONGRESO

La 74-a IFEF-Kongreso okazis en la fama belga urbo Antverpeno inter la 6-a kaj 12-a de majo 2023. En la kongreso partoprenis 85 fervojistaj esperantistoj el 11 landoj, inter ili 31 belgoj.



*Partoprenantoj de la 74-a IFEF-kongreso*

**Belgio** estas federacia lando konsistanta el tri regionoj: la Flandra, la Valona kaj la Brusela Ĉefurba. La oficiala lingvo estas la nederlanda en la Flandra kaj Brusela Regionoj, la franca estas en la Valona Regiono, kaj la germana lingvo estas en orienta parto de la

Valona Regiono. Belgio oficiale estas „Belgia Reĝlando”. Ĝi estas unu el la plej dense loĝata lando, kiu limigas norde al Nederlando, oriente al Germanio, sudoriente al Luksemburgio kaj sudokcidente al Francio. Belgio estas suverena ŝtato kaj federacia konstitucia monarko kun parlamenta reĝimo.

La duan parton de la 20-a jarcento karakterizas la kreskanta streĉo inter la franclingvanaj kaj nederlandaj civitanoj. Ĉefe inter la flamandoj estas grava separatismo. Belgio estas unu el la ses landoj, kiuj fondis la Eŭropa-Union, kies „ĉefurbo” estas Bruselo. Belgio estas evoluinta kaj prospera lando, kie la vivnivelo estas alta. Belgio havas 11,5 milionojn da loĝantoj, kaj la teritorio de la lando estas 30,7 mil km<sup>2</sup>. La ĉefurbo de la lando estas Bruselo kun 1,2 milionojn da loĝantoj.

La **kongresurbo Antverpeno** estas la plej granda urbo de la Flandra Regiono, kaj la dua plej granda en Belgio. La centro kaj la malnova urboparto troviĝas sur la dekstra bordo de la rivero Skeldo. La urbo havas grandan marhavenon, kiu estas la dua plej granda haveno de Eŭropo, pro tio ĝi havas grandan rolon por la belga ekonomio. Antverpeno estas la centro de la diamant-komerco, kiu estas la plej fama en la mondo. En la urbo vivis la mondfama pentristo Paul Rubens, kiun prezentas la Rubens-domo, kiu estis la laborejo de la pentristo. Grava konstruaĵo estas la malnova urbodomo, kiu konstruiĝis en 1406, kaj la nova urbodomo, kiu konstruiĝis en 1561, kaj ĝi estas la plej reprezenta renesanca konstruaĵo de Flandrio. Multaj muzeoj troveblas en Antverpeno, kiel la Burgo „Het Steen” kun la ŝtata muzeo pri mara navigado, la Reĝa Muzeo pri belaj artoj kaj multaj pentraĵoj de Rubens kaj de aliaj famaj pentristoj, la Muzeo MAS, la moderna muzeo, la Muzeo Plantin-Moretus, kiu estis la laborejo de la fama presisto, Muzeo „Train World”, kiu estas la muzeo de la Nacia Societo de la Belgaj Fervojoj. La stacidomo de Antverpeno estas unu el la plej belaj malnovaj fervojaj konstruaĵoj, kiu estis konstruita en 1836. La ĉefan konstruaĵon kun la kajoj, giĉetoj kaj oficejoj oni konstruis inter la jaroj 1895 kaj 1906. La stacidomo estas konata kiel „fervoja katedralo”, kaj la trajnoj veturas sur tri niveloj de la



stacidomo, kaj ekzistas servobutikoj sur la kvara nivelo. La stacidomo estas inĝeniera arto kaj arkitekturo. Inter la jaroj 1998 kaj 2006 okazis renovigo de la konstruaĵo, kiun la kongresanoj vizitis dum la duontaga ekskurso. La kongresanoj loĝis en junulargastejo, kiu estis la kongresejo, kaj de tie proksime troviĝas konstruaĵo de la universitato, kie okazis la inaŭguro de la kongreso.

Mem la **kongreso** komenciĝis kun la solena inaŭguro. En la ceremonia malfermo



*La enirejo de la stacidomo*

bonveni-gis la ĉeestantojn la gastiganta organizaĵo (LKK), la prezidanto de la Flandra Esperanto-Ligo, la reprezentanto de la provinco Antverpeno kaj la ILEI-prezidanto. La reprezentantoj de la landaj asocioj salutis la kongreson, inter ili András Barcsa el Hungario transdonis al la kongreso la bondezirojn de la hungaraj fervojistaj esperantistoj. Poste sekvis la festparolo de la prezidantino de IFEF.

Rodica Todor en sia parolado dankis la orga-

nizan laboron al la LKK-anoj kaj helpantoj kaj deziris fruktodonan kaj sukcesan kongreson.

Dum la komitatkunsido la komitatanoj traktis la akceptitajn tagordpunktojn. Inter alie la kasraporton kaj bilancon por la pasinta jaro, kaj la buĝeton por 2023, kion prezentis la estrarano Laurent Vignaud. La komitato aprobis la raportojn de la prezidantino kaj la komitatano „A” de IFEF ĉe UEA Rodica Todor, sekretario Vito Tornillo, la gvidanto de la Fake Aplika Sekcio kaj la redaktoro Ladislav Kovar, la ĉefkomitatano Zlatko Hinst. Estis decidita la lokoj de la venontaj kongresoj, laŭ tio en 2024 Strasburgo, kaj en 2025 Slovakio (Trencino) gastigos ilin.

Dum la kongreso okazis pluraj prelegoj. La plej interesa temo estis la Antverpena stacidomo, kiun prezentis Ella Strug, kiu estas memstara arkitekto kun propra buroo. Ŝi akcentis la gravecon de tiu stacidomo, kiu estas unu el la plej grava kaj impona fervoja establaĵo en la mondo. La aliajn prelegojn faris V. Ronon kun la titolo: "Historio de la unua pasaĝera fervojo sur la Eŭropa kontinento"; J. Matuška prelegis pri la difino de la kalkulado de la emisioj en la transporto por determini energikonsumon kaj kvanton de forcej-efikaj gasoj el pasaĝer- kaj vartransportoj; G. Brandenburg konigis la ciferan aŭtomatan kuplilon, kiu efektive povas esti revolucio en la fervoja vartrafiko; R. Giuhat parolis pri la pendoponto super la Danubo en la zono de Braila kiu estas unu el la plej grandaj



*La ĉefplaco de Antverpeno*

samspecaj konstruaĵoj en Eŭropo; Z. Hinst prelegis pri la fervoja linio inter Zagrebo kaj Rijeka okaze de la 150-jariĝo de la linio; V. Tornillo parolis pri la intermodala transporto, kiu uzas du aŭ pli malsamaj transportmanieroj por alporti varojn al la celloko, eĉ tiu ĉi prelego prezentas inter alie la ekologiajn efikojn de tiu ĉi transporto; R. Sözüer prelegis pri la problemoj de biciklitransporto en personvagonaro, fine J. kaj L. Niemann pere de reto konigis la danan entreprenon Tibertex, kiu produktas ne-tekstitajn fibrajn produktojn, kiujn uzas la fervojo por multaj celoj.

Preskaŭ ĉiuvespere okazis kulturaj programoj. Dimanĉe kadre de la Flandra Vespere B. Lent kaj L. Verbeeck prezentis flandran popolmuzikon per akordiono kaj popol-instrumentoj. Lunde vespere juna arĉkvarteto ludis klasikajn muzikojn. La muzikistoj estas junaj studentoj de la brusela konservatorio. Marde kaj ĵaŭde vespere distris S. Filipovic kaj G. Handzlik la partoprenantojn kun kabaredaj scenoj kaj kantoj per gitaro.



*La fervoja muzeo Schaarbeek*

Okazis duontaga kaj tuttaga ekskursoj dum la kongresa semajno. En la kadro de la duontaga ekskurso la partoprenantoj promenadis en la historia centro de Antverpeno, kaj ili vizitis la ĉefplacon, katedralon, urbodomon kaj la riveron Skeldo. La plej grava ekskurscelo estis la vizito en la centra stacidomo.

La tuttaga ekskurso kondukis la partoprenantojn per speciala aŭtobuso al la antverpena

haveno, kaj tie la ekskursantoj ekkonis la enkondukon al la belga transporto. Poste okazis la vizito per trajno kun vaporlokomotivo sur mallarĝa ŝpuro al la muzeo Schaarbeek „Train World”. En tiu muzeo la partoprenantoj povis ekkoni la belgan fervojon ekde la komenco ĝis nun, inkluzive de la unua vaporlokomotivo produktita en 1845. En la muzeo estas ankaŭ rilataj artaĵoj de la fervojo.

Entute 13 kongresanoj partoprenis en la **postkongreso**, kiu okazis en belga urbo Sharleroi, kiu troveblas en la Valona Regiono. Sabate la kongresanoj vizitis la urbon Namuro, kiu estas la tria plej grava urbo en Valonio. Post la promonado en la urbo, la partoprenantoj vizitis la citadelon per telfero. En la citadelo oni povas rigardi belegan panoramon al la urbo, ruinojn, grafan kastelon, freŝdatajn bastionojn, kanonterasojn de kiuj atestas pri la miljara historio. Okazis vizito en la industria muzeo Bois Cazier. En la sekva tago la kongresanoj vizitis la ŝiplifton de la Kanalo, kaj du kluzojn, kiuj havas 73 metrajn niveldiferencojn. La niveldiferenco estas transportita per mekanika instalaĵo. La partoprenantoj ŝipsis sur la Kanalo, de kie ili povis plezuriĝi sur la belga pejzaĝo.

Kaj la kongreson, kaj la postkongreson la partoprenantoj pozitive taksis, kaj tiel adiaŭis de Belgio: Ĝis revido en Strasburgo (Francio) en la 75-a Kongreso de IFEF.

**András Barcsa**



## NIA GENERACIO

Ni estas tiu generacio:

- ◆ kiu bedaŭrinde neniam revenas,
- ◆ kiu piede iris al la lernejo, kaj ankaŭ piede revenis el tio,



*En la lernejo*

- ◆ se la profesoro iun sendis por kunporti kreton al la sekretario, tiam li estis fiero, kiel la delegito de la UNO,

- ◆ kiu lernis sola, kaj se li ne komprenis la temon, oni ŝlosis lin en la klasĉambro, kaj li devis resti tie, ĝis kiam li komprenis la temon,

- ◆ kiu staris ĉe la tabulo kaj fiere respondis antaŭ la aliaj lernantoj,

- ◆ kiu ne iris al la lernejo kun poŝtelefono,
- ◆ kiu ricevis meritojn pro la bona respondo, kion la profesoro enskribis en la taglibron,
- ◆ kiu sole pretigis la domtaskojn,
- ◆ kiu ne iris al specialaj lernohoroj,
- ◆ kiu ne vokis siajn gepatrojn pro ĉiuspecaj problemoj, ĉar li ne havis poŝtelefonon, kaj verŝajne ankaŭ la gepatroj ne havis tion,
- ◆ kiu ne hontis transdoni la sidlokon en la aŭtobuso aŭ tramo al pliaĝuloj,
- ◆ kiu kisis la panon, kiam li ricevis tion,
- ◆ kiu mallaŭte parolis kun siaj gefratoj por ke la gepatroj ne aŭdu ilin post la enlitiĝo, eĉ li legis per poŝlampo sub la kovraĵo, se li ne povis fini la legadon post la elektraestingo,
- ◆ kiu ege respektis la gepatrojn, la instruistojn, la najbarojn kaj la parencojn, kaj li antaŭensalutas kaj dankas al ĉiuj, eĉ al siaj samlernantoj,
- ◆ kiu ludis sur la stratoj, kaj trinkis akvon el la puto,
- ◆ kiu ricevis kion ajn, li ĉiam kontentiĝis per tio,
- ◆ en kiu preskaŭ ĉiuj knaboj volis esti lokomotivestro aŭ policisto, kaj ĉiuj knabinoj kuracistino aŭ infangardistino, eĉ ĉiuj geknaboj preferus kiel eble plej rapide iĝi plenkreskulo,
- ◆ kiu konatiĝis kun virino, tiu viro donis la estimon al ŝi, kaj sentis respekton al la virino.
- ◆ Mi povus denombri la vivon kaj la aktivecon de nia generacio, sed tamen mi ŝatus akcenti, ke tiuj tempoj, kiam ni estis junuloj kaj ni vivis en aliaj cirkonstancoj bedaŭrinde ne revenas. Ni sciigu, ke la vivo rapidegas, kaj la radon de la tempo ni ne povas haltigi aŭ returni.

**István Gulyás**

# La Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres"

(25.2.2023 - 4.3.2023)

MES estas printempa unusemajna renkontiĝo de esperantistoj en suda Francio en agrabla loko ĉe la Mediteranea maro. Jam la 15-an fojon la Esperanto-grupo de St. Rafael kaj Frejŭs sub la gvido de Monique Prezioso kaj de Christine Graissaguel kun pliaj helpantoj organizis MES, laŭdire la lastan. Tamen estas espero, ke novaj organizantoj transprenos la



Partoprenantoj en la Mediteranea Esperanto-Semajno

taskon por daŭrigi la printempan tradicion de tiuj agrablaj semajnoj. Tie ni loĝis en bela hotela restadejo *Val d'Esguière*, antaŭe palaco en la tridekaj jaroj, kaj nun nomata "Village Club *Miléa-de*".

Hotelo kaj la parko estas bone

prizorgataj, la personaro estas agrabla. Ĝi estis renovigita, aldoniĝis kelkaj novaj instalaĵoj, ekstera naĝejo, tenisejoj, "Spa"-centro por homa bonfarto (natura kosmetiko, masaĝoj, magnetismo, banoj).

Ĉi-foje kolektiĝis 90 partoprenantoj el naŭ landoj por kune ĝui kursojn, diversajn prelegojn, posttagmezajn promenojn, ekskursajn vojaĝojn, vesperajn distraĵojn. Inter ni estis ukraina familio; patrino kun du ĉarmaj geinfanoj, rifuĝintinoj gastantaj ĉe franca familio loĝanta en Parizo.

Ĉe la alveno, la nova hotelestro bonvenigis nin en la franca lingvo kaj bondeziris al ni agrablan restadon. Li ankaŭ prezentis al ni la ĉefprizorganton de la kuirejo kaj animantaron de la hotelaj aktivaĵoj. Andreo Grossmann brile tradukis lian paroladon. Poste ni tostis per aperitivo, interkoniĝis kun novaj partoprenantoj kaj gaje dancis farandolon. Ĝi estas provenca ritma viveca ĉendanco, dum kiu la dancantoj manenmane serpentumas inter la publiko. Mi transdonis salutojn al la partoprenantoj de Rosa Lopéz kaj Sol kun Francesco kiuj ne povis ĉeesti la aranĝon. Christine prezentis la semajnan programon kaj la tri instruistinoj nelonge parolis pri instrumentoj en siaj respektivaj kursoj. Ĉi-foje kolektiĝis 90 partoprenantoj el naŭ landoj por kune ĝui kursojn, diversajn prelegojn, posttagmezajn promenojn, ekskursajn vojaĝojn, vesperajn distraĵojn. Inter ni estis ukraina familio; patrino kun du ĉarmaj geinfanoj, rifuĝintinoj gastantaj ĉe franca familio loĝanta en Parizo. Ĉe la alveno, la nova hotelestro bonvenigis nin en la franca lingvo kaj bondeziris al ni agrablan restadon. Li ankaŭ prezentis al ni la ĉefprizorganton de la kuirejo kaj animantaron de la hotelaj aktivaĵoj. Andreo Grossmann brile tradukis lian paroladon. Poste ni tostis per aperitivo, interkoniĝis kun novaj partoprenantoj kaj gaje dancis farandolon. Ĝi estas rovenca ritma viveca ĉendanco, dum kiu la dancantoj manenmane serpentumas inter la publiko. Mi transdonis salutojn al la partoprenantoj de Rosa Lopéz kaj Sol kun Francesc kiuj ne povis ĉeesti la aranĝon. Christine prezentis la semajnan programon kaj la tri instruistinoj nelonge parolis pri instru-metodoj en siaj respektivaj kursoj.

Dum la tuta semajno okazis instruado de Esperanto en tri kursniveletoj: la 1-a por komencantaj parolantoj estis gvidata de Zsófia Kóródy, la 2-a por progresantoj gvidata de Mireille Grosjean, la 3-a pri literaturo gvidata de Spomenka Štimec. Dimanĉon la 26-an de februaro okazis kunveno de la ĝenerala asembleo de Esperanto-Provence. Antaŭ la posttagmezaj kursoj, Svitlana el Ukrainio rakontis pri sia lando, konigis nin pri la historio, kulturo, folkloro, lingvo kaj pri aktualaj okazaĵoj en la nuntempe okupata lando.



*Instruistinoj Spomenka, Mirejo, Zsofia prezentas sin*

Dimanĉe antaŭ la tagmanĝo ni fotiĝis por la ĵurnalo *Var-Matin*, en kiu poste estis aperigita artikolo pri nia staĝo, akompanata per la komuna foto. Post la tagmanĝo estis libera tempo por promonado en la naturo aŭ por partopreni posttagmezajn ekskursojn al vizitindaj lokoj. Estis proponataj vizitoj al *San Peire*, lagetoj de *Villepey*, klostro en *Fréjus*, muzeo en *Saint-Raphaël*. Interesaj estis la vizitoj de abelejo en *Esterel*, de la muzeo de la fera Masko kaj de Reĝa Fortikaĵo en

la insulo *St. Marguerite*. Ankaŭ la hotelo proponis aktivaĵojn en kiuj ni povis partopreni. Luj preferis kartludi, triki, prilabori broĉojn aŭ tutsimple babili. Carmen, per sia nekutima brodita vestaĵo, propagandis Esperanton per simplaj frazoj. Dum la kafopaŭzo eblis salteti super la longa turniĝanta ŝnuro aŭ rigardi fotoalbumojn pri pasintaj renkontiĝoj en *Les Sambres*.

Vespere, kiel kutime, okazis diversaj prelegoj. La unuan vesperon Mireille Grosjean prezentis diversajn stilojn de arkitektoj. "Arto, lingvo - ĉu paraleloj eblas?" En la lunda vespero ni spektis filmon pri abeloj kaj Philippe Chavignon rakontis pri bredado de abeloj pri kio li estas fakulo. La postan tagon ni vizitis liajn abelujojn en la naturo kaj povis aĉeti mielon. Sekvantan vesperon Spomenka Štimec parolis pri la ĉeĥa juddevena kaj denaska esperantista knabo Petr Ginz, kiu famiĝis pri sia desegnaĵo de "La Tero vidata de sur la Luno", kiu aperis ankaŭ sur ĉeĥa poŝtmarko. Merkrede, post la vizito al Margarita insulo, kiun la organizantoj donacis al ni senpage, Hannes Larsson prezentis sian libron pri dulingva (angla kaj franca) krimromano en kiu Esperanto ludas rolon por propagandi ĝin al la publiko. Ĵaŭde vespere Mireille kaj Spomenka parolis pri Hektor Hodler kaj pri lia patro, fama pentristo.

Dum la lasta vespero okazis loterio en kiu ĉiu gajnis ion. La vespero estis dediĉita al prezentadoj de diversaj kantoj, skeĉoj kiujn la partoprenantoj mem pretigis. Aperis plurlingva sceno de vulpo kaj korvo, tri friponoj, fiŝvendisto, problemo kun lavmaŝino ktp. La plej amuza estis sceno pri ebriulo inspirata de la poemo de William Auld "Ebrijo". Ĉe la fino prezentiĝis la ĥoruso de Bernard Bigonnet. Sekvis dankoj al la organizantoj kaj al la instruistoj. Muziko de saksofonoj kaj akordionoj dancigis la partoprenantojn ĝis la noktomezo. Sabate matene jam pluraj samideanoj adiaŭis nin kaj revenis al siaj hejmoj. Tamen daŭris la kurso de Spomenka, kaj en la apuda salono Nina el Rusio prezentis al ni rusajn pentristojn: Vassily Kandinsky, Kasimir Maleviĉ, Marc Chagall kaj Konstantin Vasiliev. Dankon al ĉiuj kontribuintoj en la aranĝo, pri kiu ĉiuj estis kontentaj kaj strebis al la progreso de sia lingvonivelo. Ni ricevis multajn valorajn informojn pri Esperanto-kulturo. Specialan dankon ricevu la tuta familio de Monique Prezioso, kiu multe helpis en la organizado kaj dum la aranĝo mem.

**Liba Gabalda**



## La 39-a Printempa Semajno Internacia (3 - 10. aprilo 2023)



*La ĉefplaco de urbo Wittenberg*

Post trijara paŭzo povis denove okazi ĉeesta aranĝo PSI en bela Luter-urbo *Wittenberg*, kiu situas en la germana federacia lando Saksio-Anhaltio apud la rivero Elbo. La partoprenantoj loĝis en komforta junulara gastejo proksima al la historia centro de la urbo Vitenbergo. Al la aranĝo aliĝis 113 geesperantistoj el kvin landoj. PSI okazas en la semajno, kiam oni festas Paskon. Partoprenas ĝin multaj

familioj kun infanoj, por kiuj estas ĝojige en la dimanĉa pasko-festo serĉi ĉokoladajn ovojn kaj aliajn dolĉaĵojn. Ili ankaŭ havas programon por sin amuzi kaj lerni Esperanton, dum la plenpreskuloj povas sekvi diversajn prelegojn, diskuti pri diversaj temoj. En la programo estis proponitaj diversaj ludoj, joko, ĉigongo, ŝonglado, origami, ŝtof-kolorigado, ĉina ŝako, konstruado de paperturoj, akrobataĵoj, malstreĉa gimnastiko, zumbao. Eblas lerni Esperanton kun spertaj instruistoj, aĉeti esperantaĵojn en libroservo. La etuloj ŝatas desegni, kolorigi ne nur ovojn, rigardi Mazi-filmon, kunaktori kaj tiamaniere ili lernas Esperanton.

Alloga estis ekspozicio de portretoj kaj libroj de Helga Plötner. Ŝi estas pasia kaj talenta por portretigi famajn esperantistojn. La kvin libroj, ĉiu po 16 bildoj kaj interesaj rakontoj, estis eldonitaj pere de la eldonejo Horiozonto de Jasuo Hori en Japanio. Ŝi donis instrukciojn kiel portreti kaj mem liveris necesan materialon. Dum diversaj prelegoj ni povis ekscii pri *Bauhaus*-arkitekturo



*Paskofajro kun lardobakado*

kaj poste spekti ĝin propraokule dum la tuttaga ekskurso. Dum alia prelego pri biciklado kun BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia), ni eksciis pri

organizaj karavanoj, biciklistaj semajnoj aŭ unutagaj ekskursoj. Aldone ni estis informitaj pri "VeloRElo" - la projekto pri bicikloj en trajnoj. Ĉirilate Esperanto bone taŭgas por internacia kunlaboro.

Pri sia sperto dum la trajnvojaĝado al la 107-a UK en Montrealo rakontis André Weber. La prelego pri "Lingva terapio de la lernantoj kun milda intelekta neplenkapablo" informis pri "Centro pri plurlingvismo kaj interkultura komunikado PLURIKO". En alia prelego oni komparis la anglan kaj la Esperantan lingvojn. En ĉi tiu vintra sezono estis bone paroli pri imuneco, vitaminoj, nutrado kaj uzo de sovaĝaj plantoj kiel nutraĵo. Dum tiuj prelegoj ni estis informitaj pri multaj interesaĵoj. Ankaŭ la klimata krizo kaj la rolo de Esperanto en tiu sfero estis la temo de ĉi-semajna renkontiĝo.

Dum la semajno okazis multaj enurbaj kaj eksterurbaj ekskursoj. La interesatoj povis elekti inter vizitoj de diversaj muzeoj en la urbo mem, grimpi kastelan turon, uzi



*Diskutrondo*

turisman trajneton, por viziti domon *Lutherhaus*, bierfarejon, aŭ keksfabrikon kaj ankaŭ sperti noktan promenon tra Vitenbergo. Tre interesa kaj ŝata por infanoj estis la bestoĝardeno en la proksimo de nia loĝloko. Ĝi estas la plej malgranda zoologia parko en Germanio, sed tamen havas grandan diversecon de mal-

grandaj bestoj, ekzemple mamuloj, birdoj, fiŝoj, serpentoj ktp. Eksterurbe eblis viziti la parkon de *Wörlitz*, kiu apartenas al la mondaj heredaĵoj de UNESCO, Ferropolison, kiu iam estis brunkarba minejo, muzeon pri la filmindustrio *Wolfen*, iaman fabrikon de filmproduktado kun ekspozicio de pli ol 800 fotoaparatoj. Ankaŭ ekskursoj por biciklantoj estis programitaj .

Dum vesperaj programeroj eblis spekti diversajn filmojn, ĝui gitarkoncerton de Feri Floro. Li prezentis latinamerikajn ritmojn ĉefe el Kubo, sed ludis ankaŭ siajn proprajn amkantojn. Speciale por infanoj estis dediĉita la pupteatro "Drakofajro" de Christoph Frank. Okazis mezepoka kostumita balo kaj paska fajro ekstere kun bastonpano kaj kantado. Ne mankis paska nokta diservo. La lasta internacia vespero de la semajno estis dediĉita al artaj kontribuoj de la partoprenantoj mem. Ni spektis infanajn akrobataĵojn, rakontojn, kantojn, ŝercojn, ludojn ktp. La organiza teamo preparis buntan programon kaj meritas grandan dankon pro la laboro, dank' al kiu ni ĝuis agrablan semajnon en bona harmonio. Ĉiuj estas invitataj al la venontjara 40a PSI, kiu okazos en Bavario en la urbo *Bayreuth* ekde la 25-a de marto ĝis la 1-a de aprilo 2024.

**Liba Gabalda**



## PEKO - Printempa Esperanto-Kunveno (18 - 21. majo 2023)



*Junaj skoltoj*

PEKO estas Printempa-Esperanto-Kunveno, sed jam de kelkaj jaroj ĝi fariĝis kvazaŭ belga kongreso. Ĉi-foje oni festis la jubilean dek-jariĝon. PEKO okazis en la urbeto *Tilff*. La aranĝon organizis "Verdaj Skoltoj" sub la gvido de Valère Doumont, nomata Lupo. La organiza teamo konsistis el dek skoltestroj kaj aliaj skoltoj inter kiuj dek ses adoleskantoj kaj ok junuloj. Estis akceptitaj tri novaj skoltoj al kiuj oni transdonis nigro-verdan koltukon. Skoltoj havas kromnomojn, tiel aperis inter ni Abeló, Bizonó, Briardo, Dingo, Korsako, Magoto, Mambao, Orcino, Neĝ-

pantero.

*Tilff* estas urbeto proksima al la urbo Lieĝo. Ĝi situas en profunda valo de la rivero *Outre* ĉirkaŭata de bela naturo kaj de arbaroj por agrablaj promenadoj. La urbeto famiĝis pro sia speciala karnavalo en kiu paradas "Poreuloj" - homoj trikolore vestitaj per longaj verdaj ĉapoj kun sonoriloj, blankaj ĉemizoj kaj pantalonoj, kaj ĉe la piedoj pajlo ĉirkaŭas la krurojn kvazaŭ radikojn. Gigantoj akompanas la grupon. En la urbeto staras fontano kun kolono ornamita per poreuloj.

Pekon partoprenis ĉefe junaj homoj el Belgio, Germanio kaj Francio. Entute kvindek geesperantistoj festis la dekjariĝon. Lu Wang alvenigis sep ĉinajn gejunulojn loĝantajn en Germanio same kiel ŝi. Ili ĉeestis Esperanto-kurson por komencantoj, kiun gvidis Christine Brücker laŭ diversaj instrumentoj.

Ni loĝis en renovigita farmbieno de la kastelo *Brusonde* el la 18-a jarcento, adaptita por diversaj kulturaj okazaĵoj. Apuda lageto kun ĉisezone florantaj irisoj ĉe la rando kaj nimfeoj en ĝi, ornamas la parkon kaj donas belan vidon al la kastelo. Apud la loĝejo en antaŭa garbejo troviĝas unika muzeo pri abeloj. Ĝi prezentas filmojn pri la vivo de abeloj, posedas riĉan kolekton de abelbredaj objektoj el diversaj epokoj kaj amason da belgaj kaj eksterlandaj abeluloj skulptitaj el trunkoj. En la muzeo estas ankaŭ instalitaj du vitraj abeluloj por ebligi spekton de la agado de la abeloj. La muzeo estis inaŭgurita en la jaro 1974-a.

Dum la evento okazis diversaj programoj. Bernard Regis prelegis kaj prezentis diversajn mapojn. Skoltoj priskribis la historion de la skoltismo, parolis pri siaj agadoj, aktivadoj, distraĵoj kaj aventuroj kiujn ni povis spekti ankaŭ bilde. Ili rakontis pri diversaj grupoj, laboraj kunvenoj, semajnfinoj kaj tendumadoj. Ni eksciis multon pri skoltismo - pri la tutmonda movado, pri ĵamboreoj, totemoj, diversaj insignoj kaj



simboloj. Ili konigis al ni la skoltajn leĝon kaj promeson kaj informis ankaŭ pri



*Esperanto-kurso*

vojaĝkonkurso kaj muzikalo dum la IJK. La himno de la Verdaj Skoltoj estas: "La aŭto de la ĉef'..." Ili kunvenis krom en Belgio ankaŭ en Francio, Germanio, Hispanio kaj Nederlando. En la ĵaŭda vespero Ideal Gabalda organizis cirklodancadon. Ĉiuj fervore sekvis la instrukciojn kaj bone amuziĝis.

Dum la tago la partoprenantoj distriĝis per diversaj ludoj, kunkantis, provis muziki per tubetoj, konstruis simplajn aŭ pli komplikajn objektojn per lignaj bastonetoj, branĉetoj, tolaĵoj, papero kaj ŝnuretoj,

faris origamion, ŝtofcolorigis ĉemizojn aŭ sakojn. Okazis ankaŭ gustumado de bieroj, kaj vespere eblis spekti filmojn aŭ ĉeesti noktan ekskurson. Por la posttagmezoj estis organizitaj ekskursoj - vizito al la urbo Lieĝo kaj kajakado sur la rivero *Outre*, kie kelkaj spertis banadon ĉe renversiĝo de kajako. Iuj piedpromenis ĝis la abatejo *Brialmont*. Sur la ludtereno de la bieno aperis ankaŭ alia skolta grupo.

Ni manĝis precipe vegetare, kelkaj vegane. Bongustajn pladojn kuiris por ni Ella Strug kaj Eddy Van den Bosch kun la helpo de skoltoj en la kuirejo. Ni havis okazon

gustumi ankaŭ ĉinan manĝaĵon (farĉitan pastaĵon) pretigitan de ĉinaj gastoj kaj anas-ovojn, kiujn provizis Valèr. Ne mankis ankaŭ frititaj bananoj kun fandita ĉokolado, specialaĵo de Verdaj Skoltoj. Ĉi-foje ili ne estis rostitaj rekte super fajro kiel oni kutimas fari en la naturo, sed bakitaj en la forno.

Antaŭ la dimanĉa forveturo estis anoncita la premio de la "Granda ludo". La gajnintoj ricevis jubilan bele ornamitan botelon, kiun ankaŭ eblis aĉeti por subteni la skoltan movadon. Bone funkciis la libroservo de Fel. Esperantistoj el Lieĝo eldonis dulingvan libreton pri



*Kastelo Brussonde*


*Tilff* en Esperanto kaj la franca lingvoj. En la lasta vespero prezentiĝis la orkestro de tubistoj kaj la skeĉo pri "Kion diras vulpo?". Poste ni ĝuis koncerton de Jonny M sekvatan de diskomuziko. Ĉiuj bone amuziĝis ĝis malfruaj horoj. Estis agrabla etoso inter junaj skoltoj.

Dankon al la organizantoj.

**Liba Gabalda**

## NOVA BAZTUNELO ĈE SEMMERING EN AŬSTRIO

La nuntempa „Semmering-fervojo” konstruiĝis inter la jaroj 1848 kaj 1854 ĉe la limo de la Malsupra-Aŭstrio kaj Stirio inter urboj Gloggnitz kaj Mürzzuschlag. Tiu fervojlinio estas dutraka, elektrizita linio, kiu estas parto de la aŭstra „Suda Fervojo”. Ĝi laŭiras en la teritorio de la „Semmering-montpasejo sur ege malfacilaj terenobstakloj. Tiu fervojlinio produktis gravajn eblecojn por la fervoja pasaĝer- kaj vartransporto inter Vieno kaj la suda parto de Aŭstrio, eĉ por la adria haveno Triesto. Tiu linio estis en Eŭropo la unua montfervojo, kiu rolas en la listo de la Monda Kultura Heredaĵo de Unesko.



*La Semmering-montpasejo*

La plena longeco de la Semmering-fervojo estas 41 km-j, kaj la niveldiferenco estas 460 metroj. La fervojlinio havas 14 tunelojn, 16 viaduktojn, 100 ŝtonpontojn kaj 11 ferpontojn. La plej longa tunelo havas 1431 metrojn, eĉ inter la viaduktoj troveblas kelkaj duetaĝaj. Ĉe la fervojlinio konstruiĝis 55 bariergardisto-dometoj, el kiuj ankoraŭ 47 postrestis, kaj ili estas sub la pro-

tektado de monumentoj. Ĉe la konstruo de la tuneloj kaj viaduktoj laboris 20 mil laboristoj tra ses jaroj.


Tiu fervojlinio malfermas la vojon al la semmeringa turismo, kaj konstruiĝis multaj hoteloj kaj pensionoj, eĉ komencis kreski la kurakturismo kaj la vintraj sportoj.

Pro la malfacilaj terenobstaklo la trakcio de la vartrajnoj bezonas duopajn lokomotivojn sur tiu plej frekventata linio de Aŭstrio, la maksimuma ramplo estas 28 promiloj kaj la mezdekliva ramplo estas 20 promiloj. La plej malgranda kurboradiuso estas 190 metroj, sur kiu la trajnoj trafikis nur ege malrapide.

Pro la rapide evoluo de la transporta pretendo, jam en la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento ÖBB komencis plani novan baztunelon, kiu certigas pli rapidan fervojtrafikon kaj pligrandigon de la transportpovumo. En la naŭdekaj jaroj jam pretiĝis konkretaj planoj por nova baztunelo. Laŭ tiu plano la aŭstroj imagis la tunelon konstrui norde de la malnova fervojlinio, sed tiun planon oni devis forĵeti pro la kaŭzo de la medioprotektado. La aŭstroj ekzamenis aliajn alternativajn solvojn, inter aliaj la okcident-hungarajn fervojliniojn, sur tiuj linioj ĉefe ŝarĝtransporto estus disvolvita. La planoj plurfoje ŝanĝiĝis, kaj fine en 2010 la definitiva plano pretiĝis, laŭ tio la fervojlinio kaj la baztunelo konstruiĝos sude de la malnova linio.

La nova baztunelo estas 27,3 km-j, kiu estas kun 15 km-j pli mallonga ol la malnova tunelo. La plej granda rampo havas 8,3 promilojn, la permeso de la rapido estas 230 km/h por la pasaĝertrajnoj, kaj 120 km/h por la vartrajnoj.

Kadre de la konstruo en 2019 okazis neatenditaj problemoj. Proksime de urbo Gloggnitz



La malnova kaj nova fervojlinio (baztunelo) inter Gloggnitz kaj Mürzzuschlag

malaltiĝis la tero kaj elformiĝis kratero, ducent metroj de la loĝdomoj, kiu ĉesigo bezonis longan tempon, kaj gravan koston. La alia problemo estis en la nova tunelo, kiam

antaŭiĝis bolado, kaj la ŝlima akvo malpurigis la riveron Schwarza. Ankaŭ tiu restarigo bezonis longan tempon kaj grandan koston. Laŭ la plano konstruiĝis senbalastigajn kaj slabbetonajn relvojn, kiuj estigas elastan tavolon sub la ŝpalo el armita betono. Tiun novan teknologion aplikas nur en tuneloj, sur pontoj kaj viaduktoj. Tiu senbalastiga trako havas multajn avantaĝojn, ekz. la vivdaŭro estas 60 jaroj, kaj ĝi bezonas minimuman konservadon, eĉ la konstrutempo estas pli mallonga, kaj la vibrado kaj bruoefiko malpliigas ktp. La malavantaĝo de tiu teknologio estas, ke la kostoj estas pli altaj, estas grava la precizan inĝenieran elformiĝon, okaze de akcidento la restarigo eblas kun plena haltigo de la fervoja trafiko ktp.

Alvenis al grava punkto de la konstruo de la dutubaj baztunelo en Aŭstrio inter Gloggnitz kaj Mürzzuschlag, ĉar pretiĝis la borado unu el la du tuneloj. Oni ankoraŭ laboras de la alia tunelo, kie ankoraŭ 400 metrojn devas boradi, el la 27,3 kilometroj. Oni kutimas diri, ke „jam povas vidi la finon de la tunelo”. Sed al la plena fino ankoraŭ mankas multaj laboroj ne nur ĉe la konstruado, sed diversaj administraj taskoj, provfunkcioj, mezuroj, korektado de la eraroj, ripari la perturbojn funkciajn kaj teknikajn perturboj, preskribo de la instanco por fervojaj koncesioj ktp, ktp.

La atendebla fino de la baztunelo kaj fervojlinio estos en jaro 2030. La investadkostoj de tiu evoluigo estas 4 miliardojn da Eŭro.

Al tiu investado kroĉiĝis la rekonstruo de la 130 km-j longa fervojo inter la urboj Graz kaj Klagenfurt, eĉ decide kun novaj konstruaj sekcioj. La kostoj de tiu konstruo estas 6,1 miliardojn da Eŭro, kaj la ekspluatado okazos en jaro 2025. Sur tiu fervojlinio troveblas la 33 km-jn longa „Koral-tunelo” kaj ankoraŭ 12 pli mallongaj tuneloj, 23 modernaj haltejoj kaj proksimume 100 pontoj.



# INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ KAJ VOJAĜOJ TRA LA MONDO

## La magio de la monda Esperanto-movado<sup>1</sup>

En la eŭropa kulturo somero kutimas esti tempo de ripozo, kiam homoj provas malstreĉiĝi dum unu aŭ du semajnoj post la laciga tutjara laboro. Multaj homoj pasigas ĉi tiun periodon kun siaj familioj, dum aliaj ferias en la montoj aŭ eĉ ekzotika marbordo. Tamen



*Preĝmonto kun la Rokdomo en la malnova urbo parto de Jerusalemo*

mi havis specialajn ŝancojn dum la lastaj jardekoj pasigi la unuan duonon de aŭgusto kun aktiva ripozo kaj viziti multajn landojn sur kvin kontinentoj.

Sekve de hazarda renkonto mi konatiĝis kun la monda Esperanto-movado, kiu celas solvi la mondajn problemojn kaj krei pli bonan mondon por vivi. Tio okazigas en aŭgusto siajn internaciajn kongresojn jam de pli ol cent jaroj. Laŭ establitaj kutimoj, ĉi tiu evento okazas ie en Eŭropo

dum du sinsekvaj jaroj, kaj ĉiam sur alia kontinento la sekvan jaron. Ekde 2012 mi estis elektita kiel reprezentanto de Hungario en la komitato de Universala Esperanto-Asocio, kiu havas konsultajn rilatojn kun UN kaj Unesko. Krom tio mi ankaŭ elektiĝis membro de la Revizora Komisiono de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, tiel la partopreno en ĉi tiuj eventoj fariĝis mia oficiala devo.

Hungario jam trifoje okazigis tian mondkongreson, la unuan en 1929, kies ĉefaj patronoj estis ĉefministro grafo István Bethlen kaj grafo Gyula Zichy, ĉefepiskopo de Kalocsa. La Esperanto internacia lingvo estis ellaborita de Ludoviko Lazaro Zamenhof, okulkuracisto loĝanta en Bjalistoko, fine de la 19-a jarcento, kaj la unuaj adeptoj de la movado en Hungario estis kiam en 1911 Sándor Giesswein, papa prelato kaj ĉefpastro en urbo Győr, iĝis la prezidanto de Hungara Tutlanda Esperanto-Asocio, kiu firmiĝis sub lia gvidado kaj fariĝis prestiĝa socia organizo. Poste li estis elektita estrarano de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Ĉi tiu organizo daŭre funkcias ĝis hodiaŭ, dank' al Interreto, ni preĝas la rozaron en Esperanto ĉiunokte. Ne estas vaste konata, sed nia organizaĵo eldonas ankaŭ la plej malnovan kontinue eldonitan Esperanto-lingvan revuon en la mondo. Tio estas „*La Espero Katolika*”, kiu unue aperis ĝuste antaŭ 120 jaroj, en 1903, kaj tio eldoniĝis post 1906 kun papa aprobo.

Mi partoprenis mian unuan nacian Esperanto-Kongreson en Kameoka, Japanio en 1982, kiam mi estis studento en Universitato Nanzan, gvidata de la Verbita Ordeno (*Societas Verbi Divini* en latina lingvo). Estis por mi agrabla surprizo vidi kiel facile homoj el diversaj partoj de la mondo povis komuniki inter si danke al facile lernebla internacia lingvo. Mi spertis, ke amikecaj rilatoj formiĝis inter la partoprenantoj, kie estis nature por ĉiuj toleri la religiajn kaj kulturajn tradiciojn de aliaj homoj vivantaj en malsamaj kulturoj. La eventon

organizis Ŝintoisma religia organizo nomata Oomoto, kaj la doktrino de la organizo estis ĉizita en rokon en la korto: „Unu Dio, Unu mondo, Unu Interlingvo”.

Memorinda por mi estis ankaŭ nia kongreso en Bonaero, ĉefurbo de Argentino, kiam profitante la oportunojn donitajn de la kongreso, mi vojaĝis al la brazila-argentina landlima regiono por viziti tie laborantan hungaran misiiston, pastro János Varga. Kun lia gvido, mi atingis la famajn turismajn vidindaĵojn de la provinco Misiones, inkluzive la Iguazu Akvofalon, kaj la ruinojn de la iamaj jezuitaj reduktoj en la praarbo.

Kiam mi estis en Afriko apud Viktoria Lago en Tanganjiko, mi miris kiom da vigleco kaj vivkapablo estis en la tieaj homoj. Dum ĉie en Eŭropo la loĝantaro malpliigas pro malaltaj naskokvantoj, ĉie en Afriko mi vidis, ke la stratoj estis plenaj de infanoj kaj ĉiuj estis feliĉaj kaj kontentaj malgraŭ la malbonaj vivkondiĉoj. Mi konsentis kun So Gilsu, korea ekonomikista profesoro parolanta en nia kongreso tie, ke se la kondiĉoj estos favoraj, tiam la XXI-a jarcento povos esti la jarcento de rapida evoluo kaj plifortiĝo de Afriko.



Esperanto monumento en la korto de Oomoto

Inter miaj spertoj en diversaj landoj, nia kongreso en Jerusalemo estis sendube por mi la plej memorinda. Post la aranĝo mi veturis per buso al Betleĥemo en la Palestina Aŭtonomio kaj promenis laŭ la vojo inter la urbo Paŝtista-Kampo kaj la Preĝejo de la Nativeco en Betleĥemo, kie antaŭ dumil jaroj la paŝtistoj iris por saluti la novnaskitan Jesuon. Poste mi supreniris al Ĥajfo, marŝis al la centro de la bahaa religio sur la monto Karmel, kaj vizitis Tiberiadon ĉe la bordo de la Galilea Maro. Tio

estis la loko, kie Sankta Petro fiŝkaptis antaŭ ol Jesuo vokis lin por esti apostolo de lia nove establita religio.

Neil Armstrong, la unua homo kiu metis sian piedon sur la surfacon de la luno, diris kiam li ekpromenis sur la luno: „*One small step for man, one giant leap for mankind*” (Malgranda paŝo por homo, sed grandega salto en la historio de la homaro). Post tio Armstrong vizitis Jerusalemon kaj kiam li promenis tra la Malnova Urbo de Jerusalemo, li diris, ke kiel kristano, por li estis pli grava kaj emociplena evento promeni sur la ŝtonoj apud la Templamonto, kie ankaŭ Jesuo promenis iam antaŭ dumil jaroj, ol promeni sur la luno. Dum nia vojaĝo al la Okcidenta Muro organizita kadre de mia Jerusalema kongreso, ankaŭ mi sentis ĉi tiun specialan sperton, kiam Amri Wandel, profesoro pri astronomio en la Hebrea Universitato, klarigis al mi la historion de tiuj ŝtonoj.

Sankta Aŭgustino diris, ke la mondo similas al granda dika libro, kaj tiuj kiuj neniam vizitas aliajn urbojn, provincojn aŭ landojn, povas legi nur unu paĝon de ĉi tiu granda dika libro. Danke al la Internacia Esperanto-Movado mi povis vojaĝi al multaj landoj de ĉiuj kontinentoj, kaj tiel mi povis konatiĝi kun la kulturaj kaj religiaj tradicioj de multaj popoloj. Ĉi tio riĉigis mian vivon kaj nun kiel maljuna homo mi povas diri, ke mi povis legi multegajn paĝojn de tiu granda, dika libro.

**D-ro Gábor Márkus**

1. Ĉi tiu artikolo aperis origine en la somera eldono de revuo VILÁGPOSTA en hungara lingvo.



## LA TAGO DE BIRDOJ KAJ ARBOJ

Ekde pli ol 120 jaroj la hungaroj rememoras pri gravaj kaj specialaj estaĵoj, ĉar en jaro 1902 oni organizis unufoje en Hungario la „Tagon de la birdoj kaj arboj”. Ekde tiam ĉiuj 10-a de majo estas unu el la grava evento de la naturprotektado.

La homoj ŝatas la monaton majo, ĉar en majo reviviĝas ĉio en la naturo. La arboj denove disverdiĝas, la migraj birdoj revenas, kaj birdoj kantas kaj pepas en la arbaroj, parkoj kaj ĝardenoj. Post la ĉijara longdaŭra malvarmeta vetero la homoj sopiris la sunbrilan naturon, por ke ĝi plenigu ilin nevideblajn energiojn. Ĉar la arbaro donas ne nur etenditajn travivaĵojn, distriĝon kaj trankviliĝon, sed ankaŭ vitalizas la homojn. La homaro scias tion komence, ke la arboj, kreskaĵoj donas bonfaremajn efikojn, sed nuntempe denove devas malkovri tiun proprecon.

La arbo estas la pli praa, universala simbolo en la tuta mondo, kaj la simbolo de la vivo,



renoviĝo kaj la evoluo. Kompreneble la arboj produktas oksigenon, filtras la polvon, certigas la krudmaterialojn por la konstruado, malpliigas la damaĝajn gasojn. Do la arboj estas gravaj partoj de la natura medio.

La arboj vivas longan tempon, kelkaj ekzempleroj atingas plurjarcentojn eĉ milojn da aĝo, kaj dume kreskas alte, eĉ kelkaj specoj atingas la 115 metrojn. En Hungario la arbospecoj estas ĉiamverdaj, aŭ alinome daŭrfoliaj (46 specoj), kaj falfoliaj (110

specoj). La ĉiamverdaj specoj apartenas al la koniferoj, kiel la piceoj, larikoj, abioj, arbaraj pinoj ktp. Al la falfoliaj specoj apartenas la kverkoj, muskaj kverkoj, betuloj, fagoj, platanoj, alnoj, aceroj, tilioj, salikoj kaj hipokaŝtanoj. Eblas grupigi la arbojn laŭ la rikolto, ĉar ekzistas manĝeblaj kaj nemanĝeblaj arboj, eĉ multaj arboj ne havas terprodukton. Ankoraŭ multspecaj klasifikoj estas pri la arboj, sed momente tiom estas sufiĉa.

La birdoj apartenas al tute aliaj konceptoj kaj imagoj, kiel la arboj. La birdoj materiigas la ĉielan animon, liberigas nin kontraŭ la insektoj, kaj donas al la homoj ĝojon kaj tranviliĝon pere de iliaj kantoj kaj pepoj.

En la mondo ekzistas pli ol 10 mil birdospecoj. En Hungario entute 359 birdospecoj vivas, kiuj estas sub la naturprotektado, kaj el tio 44 specoj estas grave endanĝerigataj specoj. La birdojn oni povas klasifiki en diversaj klasoj, el kiuj mi mencias kelkajn. Ekz. la migraj birdoj, rabobirdoj, akvobirdoj, buntaj kaj koloraj birdoj, kantobirdoj, arbaraj birdoj, ĝardenaj birdoj ktp. Do ni festu tiujn mirindajn vivulojn, kaj ni ĝoju, ke tiuj vivuloj ekzistas en la mondo.

Ĉiuj homoj ŝatus rigardi la vivon kaj la panoramon en la arbokrono, ĉefe la birdojn kaj aliajn vivulojn kiel la sciuroj kaj mem la arbojn. Specialan travivaĵon ricevis tiuj turistoj, kiuj serĉis tiujn vojstreketojn, kiuj ne kondukas sur la tero, ankaŭ ne sur la akvo, sed en la aero. Promenadi inter la foliaroj de la arboj donas al la vizitantoj novan perspektivon. Tiu perspektivo donas al la ĉeestantoj ĝis nun neatingeblajn eblecojn, montras specialan mondon, kiun ĝis nun la homoj povas ekkoni nur el la naturfilmoj. La sekreton de la vivo inter la frondaroj montras al la vizitantoj, kaj malfermas novan perspektivon pri la vivo de la birdoj, sciuroj kaj mem la arboj, eĉ belaj vidaĵoj prezentiĝas al la okuloj



la belega panoramo. En la pasintaj jaroj multaj instruojstrekoj estiĝis en Hungario, eĉ multaj inter la foliaro. Mi prezentas kelkajn el ili:

- ♦ en **Makó**, kie laŭ la rivero Maros la arbokrona promenejo donas verajn aventurojn. La vizitantoj povas trairi sur la pendoponto, kie oni povas ripozi sur la cepoteraso kaj el la elvidejo oni povas foriri sur la grandega deglitejo,
- ♦ en **Kaszó** la arbokrona promenejo estas vera travivaĵo en la teritorio Somogy, kie la promenejo helpas konatigi la vivularon de la regiono,
- ♦ la arboĝardeno de **Jel** estas fama pro la rododendroj, kaj ĝi havas tiun arbokronan promenejon, kie ekparolas la ĉilokaj birdaj specoj. Ĉe la fino de la promenejo troveblas deglitejo,



*La Eŭropa Kardelo*

- ♦ meze de la arbareto Erzsébet en **Gyomaendrőd** la partoprenantoj povas promenadi sur la tegmento de la arboj, de kie fabela landvidaĵo prezentiĝas al la rivero Körös, Ĉi tie la vizitantoj povas elprovi la vitroelpaŝon, kiu troveblas 15 metrojn super la tero,
  - ♦ en la parkbaro de **Karcag** 40 interaga stacio donas ekscitan promenadon inter la foliaroj, kie ĉe la fino de la vojo atendas la partoprenantojn interesa deglitejo,
- ♦ en la montaro Gerecse troveblas la instruojstreko de **Tardos**. La promenejo estas rondforma, kies diametro estas 44 metroj. Ĝi estas senbara, pro tio povas vizitadi la promenejon per rulseĝo kaj beboĉareto,
- ♦ en la okcidenta montaro Mecsek troveblas la **Sásvölgy**, kie konstruiĝis arbokrona promenejo, kaj instruojstreko, eĉ arbara ludplaco,
- ♦ apud la urbo Kaposvár troveblas la **Deseda-Kalanderdő**, kiu havas aventuran promenejon, kiu estas vera ekskursejo. Kiuj alvenas tien, tiuj povas provi sian lertecon. La arbokrona vojstreko ankaŭ ĉi tie finiĝis per deglitejo,
- ♦ 15 km-j de la urbo Bonyhád troveblas la **Lengyel-Annafürdő**. En la pitoreska loko konstruiĝis kastelo. Tie oni povas viziti la bestoparkon, arbaran ludplacon, arbokronan instruojstrekon kaj elvidejon,
- ♦ apud la fama termalbanejo **Hévíz** la ĉeestantoj povas starti sur la Tavirózsa vojstreko. Tiu vojstreko enhavas la arbokronan elvidejon, kiu havas 15 metrojn altecon,
- ♦ fine mi prezentas la arbokronan instruojstrekon en **Pannonhalma**. Mem la vojstreko krudformazas fiŝfiguron, kiu troveblas apud la elvidejo „Boldog Mór”.

Mi interesiĝe atendas la efektivigon de la ceteraj arbokronaj promenadoj.

**István Gulyás**

## 75-jara la Budapeŝta Infanfervojo



*Infanfervoja trajno dumvoje*

Okaze de la 75-jara jubileo okazis solenaĵo, kio okazis en la stacio „Széchenyi-hegy”, kie la partoprenantoj inaŭguris memortabulon. La ĉeestantoj aŭskultis festajn paroladojn, poste la blovorkestro kaj la ĥoro de la infanfervojistoj donis nivelan programon. La partoprenantoj vizitis al eta muzeo, kiu prezentas la 75-jaran historion de tiu fervojo. Sendepende de aĝklaso rikoltas brilan sukceson la veturilprezentado, ja oni rajtis eniri al la kondukistejo, kaj povis rigardi diverstipajn vagonojn kaj lokomotivojn. La vizitantoj rajtis eniri al la nostalgia motorvagonaro, eĉ

ankaŭ al la salonvagono kaj la poŝtvagono. En la lokomotiv-deponejo la publiko sukcesis denove pririgardi la Mk49 tipan lokomotivon, kiu estis ekspoziciita dum dekunu jaroj en la stacio „Széchenyi-hegy”, kaj nun renovigite sin prezentis al la vizitantoj. En la fabrikhalo kiu estis lokomotiv-remizo okazis ekspozicio pri la foruzitaj objektoj de la infanfervojo, kaj multaj fotoj pri la iamaj infanfervojistoj. Multaj ĉeestantoj eltrovis siajn fotojn sur la murtabuloj kaj nomojn en la malnovaj taglibroj. La partoprenantoj de la solenaĵo ĝuis la kolorajn programojn, kiu okazis dum la tuta tago.

La konstruo de la 11,2 km-jn longa Infanfervojo komenciĝis 11-an de aprilo 1948. La konstruo de la unua tri kilometraj etapo ekiĝis en la monto Széchenyi, kie konstruiĝis la finhaltejo „Széchenyi-hegy”, la haltejoj „Normafa”, „Csillebérc” kaj „Virág völgy”. Ĉi tie la trajntrafiko ekveturis la 31-an de julio 1948. La konstruon oni daŭrigis en du etapoj ĝis la finhaltejo „Hűvös völgy”. La lasta etapo de la konstruo enhavis la plej multajn malfacilaĵojn, ĉar tie troveblas 200 metrojn longa tunelo, viadukto super la publikvojo, lokomotivremizo kun turnoplato, centra konstruaĵo kun kuirejo, manĝejo, vestiĝejo kaj oficejoj. Nur la fakuloj povas taksi, ke dum la konstruado de la 11,2 km-jn longa linio oni devis solvi tiujn taskojn, kiuj ĉe la kutimaj fervojkonstruado ne okazas. Tiaj estas, ke la konstruo okazis en la verda zono de Budapeŝto, atenti pri tio, ke la elformiĝo de la linio kaj la pluaj teknikaj establaĵoj akomodiĝu al la ĉefurba medio kaj specialaj preskriboj.

Mi rimarkas, ke dum la 75 jaroj entute pli ol 16 mil pioniroj resp. infanfervojistoj deĵoris en la infanfervojo praktike en ĉiuj laborkampoj, kompreneble apud la kontrolo de la plenkreskulaj fervojistoj. La celo de la infanfervojo estis, ke la infanoj riĉigu kun vivdaŭra travivaĵo kaj sperto, kaj ili elektu la fervojistan profesion.



*Infanfervojisto startigas trajnon*

**István Gulyás**





## Nostalgia vaporlokomotivo en Ĉeĥio

Fonto: V. Tornillo



## La hungara urbo Kőszeg, kie okazis urbovizitado dum la Landa Amika Fervojista E-Renkontiĝo

Fonto: Vikipedio